

Tamen



Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JANUARO 2010, JARKOLEKTO 28

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@bigpond.com

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

”Panjo, en la lernejo oni diras, ke mi senĉese mensogas.”

”Sed Gilmour, vi ankoraŭ ne vizitas la lernejon.”

La biblioteko de Esperanto en Sudaŭstralio

Certe kaj sendube la plej multaj el vi jam aŭdis pri tiu elstara biblioteko, ĉu ne? Niaj membroj, almenaŭ la plej aktivaj el ili, regule prunteprenas iujn kaj kelkajn el la bonaj verkoj troveblaj en ĝi.

Ni kompreneble akceptas grandanime donacojn al tiu biblioteko populara. Inter la multaj valoraj volumoj tie troviĝas ankaŭ tiun de Geoffrey Sutton “Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto”. Decas aldoni, ke oni ne bezonas esti perfekta esperantisto por povi legi ĝin, ĉar ĝi estas verkita originale en la angla, kiun ni ĉiuj, malgraŭ ĉio, tre amas!

Ankaŭ Geoffrey Sutton amas la anglan, sed ne nur tiun. Li amas ankaŭ Esperanton, kiun li eklernis en 1962. En 1969 li publikigis ”Konciza historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo.

En la universitato de East Anglia (1972-1973) li studis skandinavan literaturon kaj la svedan. En la universitato de Upsalo de 1973 ĝis 1980, li iĝis ’filosofie kandidat’ en finno-gra kaj nordaj lingvoj.

Do tiu Geoffrey Sutton scias multon pri lingvoj kaj certe rajtas sin esprimi. Indas legi lian verkon pri la Esperanta literaturo!

Indas nun mencii ankaŭ alian elstaran verkanton Esperantistan, nome la de ni ĉiuj konata kaj tre respektata Paul Desailly. Ne ĉiuj ankoraŭ scias, ke li verkis la grandiozan verkon ”Realigas la mondan pacon la bahaa kredo kaj Esperanto”. En nia mondo, kia ĝi estas hodiaŭ, necesas legadi tiun verkon de Paul Desailly. Nia mondo estas eĉ treege materia, kaj estas bone legadi pri spiritaj aferoj.

Mi esperas ke almenaŭ la plej multaj el ni aspiras al mondpaco. Ankaŭ tiu libro troviĝas en nia biblioteko.

Plenigas pastro la geedziĝateston. Ĉar li ne estas tute certa pri la dato, li rigardante la novedzinon demandas la novedzon: “Estas la kvara, ĉu ne?”

“Ho, ne, tute ne, s-ro pastoro, ŝi estas nur mia dua!”

Leginte paĝon 185 – aŭ eble 131 de la ”Fundamento de Esperanto” de L.L. Zamenhof, naŭa eldono, 1963, - unikaj libroj devas havi almenaŭ du malsamajn numerojn sur ĉiu paĝo, ĉu ne? - mi sentis min inspirita verki la sekvantan. Mi pardonpetas al tiuj, kiuj ne komprenas kial:

Ĉu la malsanulejo malsanas?

Fakte mi tute ne estas certa, ĉu la priparolota malsanulejo estas malsana. Sed certe iuj estas konvinkitaj pri tio. Temas pri la Reĝa Malsanulejo Adelajda. La nunaj regantoj ŝajnas kredi, ke tiu resanigejo malsanas, kaj ke ĝi tiom serioze suferas, eĉ suferegas, ke ne plu valoras la penon lasi ĝin pluvivi. Laŭ tiuj, kiuj evidente regas, estas multe pli humane senvivigi ĝin, enterigi ĝin kaj konstruigi ion alian sur ĝia tombo.

Nu, kompreneble oni devas esti multe pli naiva ol la polico permesas, se oni kredas tion. Ni, kiuj bone, eĉ bonege, konas la regantojn, scias, ke oni ne devas kredi ion ajn, kion ili diras.

Krom la sanigejo estas en Adelajdo, la ĉefurbo de Sudaŭstralio, ankaŭ bona kaj ofte bone funkcianta stacidomo. Tuj apud ĝi situas la granda kongresejo, kiun ni iam utiligis kaj esperas ankoraŭ multajn fojojn uzadi, ĉu ne? Nu, la regantoj ial provas persvadi nin kredi, ke konstruigante novan resanigejon kostantan multajn miliardojn da dolaroj, oni farus al la adelajdaj gemalsanuloj eĉ tre grandan komplezon. Mi diras konstruigi, ĉar politikistoj neniam ambicias al peza laboro, tial ili elektas la postenon de politikisto, do laŭ ili estas bona ideo konstruigi alian kaj tute novan malsanulejon ie apud la stacidomo, kie la grundo estas venenigita. Do ne nur la nova sanigejo, sed ankaŭ la gemalsanuloj kaj gemalsanulidoj, kiuj devos loĝi en ĝi ioman tempon, estos devigataj enspiri la venenon elvenontan el la grundo. La regantoj imagas, ke ni ĉiuj admiras ilin, pro tiu bona ideo, ĉu ne? Tial la kontraŭuloj, mi ne mencios ilian nomon, ĉar neniu scias kion oni riskas en tiuj ĉi tagoj de histerio kaj falsa propagando kontraŭ la t.n. terorismo. Oni eĉ ne rajtas sendi paketon eksterlanden ne montrante al la poŝtoficistino sian aŭtomobilveturigpermesilon. Sed la kontraŭuloj, tiuj, kiuj kontraŭas ĉion ajn, kion diras la nunaj regantoj, decidis ke pli bone estas nenion

konstruigi, sed anstataŭe lasi ĉion, kia ĝi estas kun eble kelkaj malgravaj ŝanĝoj. Tio ŝparus al la impostopagantoj unu milionon da dolaroj. Espereble tio klaras al vi ĉiuj. Ili do asertas, ke multe malpli multekoste estus nenion konstruigi, sed lasi ĉion kia ĝi jam estas, ĉu ne? Neniu ĝis nun demandis min. Se ili kuraĝus tion fari, mi respondus, ke oni ŝparas eĉ pli, se oni lasas la malsanulejon tie, kie ĝi estas. Do eble ankaŭ mi estas kontraŭulo. Laŭ mia scio la malsanulejo ne malsanas. Mi mem iam laboris tie. Eble io en la cerbo de iu el la regantoj malsanas. Aŭ eble eĉ en la cerbo de ĉiuj el ili.

Kion iu ajn gajnos, se oni senvivigos sanigejon? La malsanulejo ne malsanas, do kial senvivi ĝin? Ĝi havas multajn bonegajn konstruaĵojn, ĉu ne? En ili estas ĉio necesa. Komunaj manĝejoj por la (re)sanigistoj kiel ankaŭ por la (re)sanigistinoj, do por la geresanigistoj. Estas bonaj laborejoj, en kiuj la geresanigistoj povas komforte labori resanigante la gemalsanulojn. Troviĝas tie multaj sufiĉe bonaj steriligiloj kaj steriligejoj kiel ankaŭ steriligilejoj. Se mi forgesis mencii ion ajn, vi mem espereble povas aldoni tion. Estas ankaŭ bonaj kuirejoj, banejoj ktp. Estas en ĝi multaj diversaj oficejoj, en kiuj la malsanulistoj povas trankvile trastudi la malsanullistojn. Estas tie eĉ vendejoj kaj kafeterioj, en kiuj oni povas, se oni havas sufiĉe da mono, aĉeti manĝaĵon. Estas eĉ treege grandega aŭtomobilrestadigejo. Ĝi estas bona, sed bedaŭrinde oni devas pagi multe da mono por restadigadi sian aŭtomobilon tie. Eblas ricevi senpagan resanigadon en la malsanulejo, sed ne senpagan viziton.

Do, ŝajnas ke la nuna sanigejo ne malsanas. Ne malŝparu pli da mono, sed eduku kaj dungu multe pli da sanigistoj. Se necese pligrandigu la malsanulejon, enmetu multe pli da litoj en ĝin por malplilongigi la atendotempon de la malsanuloj. Inventu, se necese pli da sanigiloj, sed ne troigu la uzadon de ili, se ili kunportos kun si pli da danĝeroj por pliaj malsaniĝoj.

Demandas patrino al sia eta filo: "Sed kial vi ploras, Gaŭfridus?"
"Ĉar mi falis kaj vundis la genuon."
"Kiam tio okazis?"
"Antaŭ duona horo."
"Sed tiam mi ne aŭdis vian ploradon."
"Mi ne sciis, ke vi estas hejme."

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 6an de januaro la legorondo renkontiĝos en Flegejo Morpeth, 52 Esplanade, Semaphore, je la 10.30a horo.

La AEA-somerkursaro okazos en Sidnejo de dimanĉo la 10a ĝis lundo la 25a de januaro 2010.

Merkredon la 13an de januaro la legorondo renkontiĝos en Flegejo Morpeth je la 10.30a horo.

La Novzelanda Kongreso okazos en Velintono de mardo la 26a de januaro 2010.

La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso refoje okazos en Adelajdo. Kiel sciate, la unua AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911.

Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!

Demandis edzino, kies nomo estas Phoebe, sian edzon Cesare, ĉu li bonvolas akompani ŝin al la baledo. Post la spektaklo Cesare grumblas, eĉ grumblegas: "Mi nenion komprenas. Ili ĉiuj dancas sur la piedfingroj."

Phoebe: "Sed kion precize vi ne komprenas?"

Cesare: "Kial ili ne simple dungas pli altajn dancistojn?"

La angla plu konkeradas la mondon

"Nur en Svedujo ekzistas lagom" nomiĝas freŝa, populara libro de la sveda lingvisto Mikael Parkvall pri lingvaj mitoj. La titolo aludas al la sveda vorto "lagom" (sufiĉe, precize, tute disvastiĝinta kredo diras sveda popolkaraktero – unike sveda fenomeno. Parkvall atakas ankaŭ la multaj homoj parolas la "Esperanto ne estas funkcia lingvo". Li tamen kredas, ke la rolo de la angla lingvo en la mondo plu kreskos.



Libera Folio: Kial vi kredas, ke malmultaj homoj pretas sinteni serioze al Esperanto? Kaj kial vi mem tion faras?

Mikael Parkvall: Hu, jen malfacila demando. Mi mem ofte miris pri la sama afero, sed ne tute certas kion kredi. Plej proksime al respondo eble estas diri, ke homoj ligas lingvon kun kulturo kaj nacio en malsama maniero ol mi. Kvazaŭ jene: "Multaj legas Ŝekspiron, do li devas esti bona, Kaj Ŝekspiro ne estus bona, se la lingvo ne estus bona. Do la angla estas bona. Kaj vidu, anglalingvanoj koloniigas

distancajn kontinentojn kaj lanĉis spacveturojn, kaj tio apenaŭ eblus, se ilia lingvo estus tia aĉa kaĉo kiaj supozeble la plej multaj aliaj lingvoj estas. La angla devas esti pli bona ol ekzemple la sveda, ĉar alikaze ankaŭ la sveda havus sian Ŝekspiron. Ĉu Esperanto havas Ŝekspiron? Ne, jen vidu. Tio ja devas ion signifi.”

Mi ne scias, sed eble tiel homoj pensas. Ofte aperas argumentoj pri tio, ke lingvo devas havi plurjarcentan historion kaj grandajn poetojn por valori ion. Tamen, efektive la plej multaj homoj, kiuj iel elturniĝas en la angla, neniam legis Ŝekspiron kaj verŝajne eĉ ne Sidney Sheldon. Eĉ sen tio tute bone eblas diri “Special price, only for you”. Kaj eĉ verki disertaĵon en la angla. (Tion mi povas mem atesti.)

Ke mi mem serioze sintenas al Esperanto dependas (aŭ tion mi volas kredi) de tio, ke mi estas sciencisto, kaj tial komplete malferma kaj senantaŭjuĝa. Mem mi kompreneble kredas, ke lingvoj ne iĝas grandaj pro siaj internaj ecoj, sed ke tio pli dependas de la kvanto de mono kaj nukleaj armiloj, kiujn la parolantoj havas.

(Ke mi iom pozitive sintenas al Esperanto rilatas al personaj politikaj pritaksoj kaj valoroj. Kiel sciencisto mi kompreneble opinias nenion ajn pri io ajn, krom se tio estas science provebla...)

L.F. Por kio laŭ vi Esperanto povus utili?

M.P. Por paroli, ĉu ne? Inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon. Tio ja kvazaŭ iel estas la ideo...

L.F. Kial do la angla ne taŭgus por tiu celo?

M.P. Pro du kialoj. ”natura” lingvo estas pli ĉio alia egalas), ĉar la evoluo, kiujn homoj gravaj, kontribuis al la balasto (neregulaĵoj kaj



Unue, mi kredas ke malfacile lernebla (se jarcentoj aŭ jarmiloj da ĝenerale opinias tiom estiĝo de amaso da tia merdo). Mi ne

profunde studis la koncernan literaturon, sed mia ”impreso” estas, ke kelkaj studoj subtenas tiun penson, eĉ se la rezultoj ne estas tute sendisputaj.

Tie ni kompreneble havas la problemon ”se ĉio alia estas egala” – eĉ se ni donas al Esperanto same multajn lecionhorojn kiel al la angla, la fakto restas, ke la lernantoj

estas elmetataj al Big Mac kaj Britney Spears dum la restantaj horoj de la tagnokto.

Due, la neŭtraleco. Mi ne volas ke Gordon Brown kaj Barack Obama povu uzi la lingvon por formanovri miajn reprezentantojn (kaj poste ridi al ili en la kulisoj). Homoj kiaj Margot Wallström [sveda EU-komisionano] aŭ Anders Borg [sveda ministro pri financoj] eble opinias, ke tio estas brila ideo, sed mi ne estas same entuziasma. En iuj el la internaciaj konferencoj, kiujn mi foje vizitas, mi vidis ke tio okazas.

L.F. Kio laŭ vi estus bezonata, por ke Esperanto povu ekhavi pli rimarkeblan rolon ie en la mondo?

M.P. Ke homoj komencu iom pripensi aferojn? Unu el la malmultaj, mikroskope malgrandaj fenestroj, kiuj malfermiĝis en la moderna tempo, estas Eŭropa Unio. Iom post iom EU iĝos la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, sendepende de tio, kion homoj diras. (Atentu, ke mi neniel diras, ke tio estas malbona, mi nur ne kredas, ke la integriĝo en iu magia maniero ĉesos morgaŭ), kaj finfine EU ne plu toleros kvintilionon da oficialaj lingvoj, sed metos la emfazon je unu aŭ eble du, eble eĉ tri. Mi *kredas*, ke la angla estos unu el tiuj, kaj ke oni, sed nur dum transira periodo, eventuale elektos unu aŭ kelkajn pliajn, sed mi vidas ankaŭ minimuman, sed tamenan ŝancon por Esperanto ĉi tie.

L.F. Ĉu la ĉina estos la sekva plej uzata lingvo en la mondo?

M.P. Ĉiuj ja aŭtomate supozas, ke la mandarena estas la ĉampiono de la morgaŭa tago. Kaj ja estas kelkaj aferoj, kiuj subtenas tiun supozon. Sed (aŭ ĉu nur temas pri tio, ke mi emas ĉiam oponi?) mi foje opinias, ke oni tro facile anticipas tiun venkon. La angla havas kelkajn atutojn, kiuj mankas al la mandarena, ekzemple geografia disvastiĝo, kaj la fakto, ke la terglobo pro historia hazardo tutmondiĝis ĝuste dum la periodo, kiam regis la angla lingvo.

En ajna kazo la angla estos granda ankoraŭ dum longa tempo – ofte oni povas konstati certan prokraston en la rilato al lingvoj kaj imperioj. Eble estas nejuste kompari kun tia malnova kazo kia la latina, sed multe el la disvastiĝo de la latina ja okazis dum la romia imperio jam estis degeneranta. Mi emas kredi, ke la samo validas por la usona

imperio, kaj kultura tutmondiĝo ankoraŭ dum ioma periodo estos preskaŭ sinonima kun usoniĝo.

Stanislaw Rynduch komentis: Karaj miaj, mi ne estas lingvisto, nek sciencisto, sed esperantisto de pli ol 50 jaroj, mi interesiĝas pri lingvistiko kaj precipe pri politiko kaj historio kaj sufiĉe bone povas pritrakti.

Do, kion diras la voĉo de la popolo? Laŭ mia vidpunkto ĉiam la lingva hegemonio estis ligita kun imperiaj interesoj. Tiel estis en la roma imperio kaj poste ĉiuj volis same. Ne alie estas kun la anglo-usona. Ne temas pri tio, ke popoloj sin komprenu, sed lingve subjugi por garantii proprajn profitojn kaj influojn. Lingva hegemonio garantias ne nur ekonomian, sed ankaŭ politikan kaj kulturen profiton kun senmezureblaj perdoj por la malgrandaj nacioj.

En Eŭropo estas tute alia situacio kaj oni ne povas kompari kun la situacio kia ĝi iam estis en Usono, nek en la koloniigita tempo de Britujo. Estas ĉiam la plej danĝera loko de konfliktoj, tie, kie loĝas la plej dense diversaj popoloj. Ili ofte luktis jarcentojn por sia libereco kaj lingvo. Mi estas 100%-e certa, ke kiel iam kun la franca, germana kaj rusa ili ne konsentos akcepti kolonian, imperian lingvon, kiu profitos nur al tre malmultaj.

Pli aŭ malpli frue ili ne konsentos esti popolo de dua aŭ tria klaso. Se niaj ideologoj kaj politikistoj vere deziras sekuran estontecon por EU, ili vere komencu alian lingvan politikon. Pro la konformismo la popolo por momento povas akcepti certigante sian "panon".

Krom tio mi ne konsentas kun la aserto de Mikael Parkvall, ke Esperanto ne havas Ŝekspiron. La aliaj lingvistoj povas certigi, ke la traduko de la Sankta Biblio konatas kiel la plej bona en la mondo. La traduko de Mickiewicz de la pola epopeo "Sinjoro Tadeo" en Esperanton estas la nura, kiu povis respeguli 13-silabajn versojn. Krom tio mi volas nur rememorigi, ke pro la origina verkado William Auld estis proponita por la Nobel-premio. Krom tio oni devas diri, ke ankaŭ aliaj lingvoj ne estas malpli bonaj ol la angla, nur ke ili ne havis "imperiajn fortojn".

Kaj aldonas heroece ankaŭ nia amiko Gunnar Gällmo: Mi dirus ke la ora epoko de la latina ne "okazis dum la

romia imperio jam estis degeneranta”, sed kiam ĝi estis jam antaŭlonge falinta, dum la mezepoko. La romianoj mem uzis ĝin ĉefe en la okcidenta duono de la imperio; en la orienta, oni uzis pli la grekan.

Sed tiam ne ekzistis interreto. Nuntempe komunikado okazas multe pli rapide, same ŝanĝiĝoj; kaj fakto estas, ke la anglalingva parto de la reto proporcie ŝrumpas. Komence la reto estis preskaŭ nur anglalingva, ĉar usondevena.

Kaj ĝuste la reto, kaj la retpoŝto, atentigas nin kiel diable malfacila estas la angla literumado.

El Libera Folio

Kaj jen la lasta novaĵo de la jaro

Sabaton la 12an de decembro ni festis la 150an datrevenon de Zamenhof. La vespero estis bona, eĉ bonega. Partoprenis entute 19 personoj, inter kiuj Heather Furby kaj ŝia filino, kiu jam komencis lerni nian lingvon. Ili aktive partoprenis ne nur la komunan kantadon, sed Heather ankaŭ la akompanantan muzikon. Do ni estis entute tri gemuzikantoj: Indrani per piano, Heather per irlanda fluto, kaj Bob per sia – almenaŭ de li mem – amata mandolinbanĝo.

Partoprenis ankaŭ la longe ne vidataj Mike kaj Katarina Taggart. Estis eĉ tre bonege revidi ilin. Partoprenis ankaŭ sinjoro, kiu eĉ tre interesiĝas pri nia belega lingvo. Li deziregas kiom eble plej baldaŭ eklerni ĝin. Partoprenis ankaŭ Gloria Bristow, tro longe ne vidata. Kaj Helen revenis post tro longa malsaniĝo. Ŝi nun fartas multe pli bone. Estis bone, eĉ bonege (re)vidi ilin ĉiujn. Ni esperas revidi ilin ĉiujn dum niaj regulaj kunvenoj !

Ni komencis la feston per festparolado de Trevor. Majstre tradukis Brendan. Poste prezentis amuzaĵojn multaj el niaj gemembroj. Carol, la edzino de Brendan, distris nin per ekzotika danco. Nur tiam komenciĝis longa, eĉ longega komuna manĝegado.

Post tio ni eniris la muzikĉambron de Indrani, kie staras ŝia piano. Tie ni komune kantadis kantojn pri Zamenhof kaj Esperanto. Ĉiuj eĉ tre ĝuis la longan vesperon.